

Paul Gerhardt,
 Transdonu vian vojon

tradukita de Hendrik Arie de Hoog

1. Transdonu vian vojon,
 la zorgojn de la kor',
 turmentojn aŭ malĝojon
 al Dio, la Sinjor'!
 La mondon Li ja movas.
 La vent' obias Lin,
 por nub' Li vojon trovas;
 ĉu Li ne gvidus vin?

2. Al l' Eternulo fidu
 en pen' aŭ en esper';
 Li viajn agojn gvidu
 kaj certas la prosper'.
 Se homo nur lamentas
 pri sia sort' sen fin',
 lin Dio ne atentas,
 nur preg' atingas Lin.

3.

4. La vojon vian ame
 elektas Li; tra bon'
 aŭ tra suferoj same.
 Li gvidos laŭ bezon'.
 Nenio Lin retenas,
 ĉar venkas Lia grac'.
 Li siajn idojn benas
 per amo, fido, pac'.

...

5.

6. Kaj fidu Lin, animo,
 ĉar vin ja tiros Li,
 eĉ el plej granda timo
 kaj ĉiam miros vi,
 se krede vi atendos,
 ĝis Li en sia hor'
 por via help' descendos
 kaj brilo Lia glor'.

7.

8. Kaj kredu, ke Li reĝas
 eĉ kontraŭ falsa ŝajn'.
 Se vi persiste preĝas,
 Li helpos iel ajn.
 Ne kredu, ke vi devos
 droniĝi en labor'
 senfina; ne, Li levos
 vin al la patra kor'.

9.

...

10.

.....

11.

.....

12. Li faros vian vojon

plej luma en la fin',

preparos por vi ĝojon

kaj feliĉigos vin.

Jam sonas laŭdo-psalmoj,

jam vokas vin la cel',

jam logas vin la palmoj,

ĉe l' pordo de l' ĉiel'.

*Traduko de la Germana poemo "Befiehl du deine Wege" de PAUL GERHARDT (*1607-03-12 – †1676-05-27) en Esperanton de HENDRIK ARIE DE HOOG (*1910 – †2001) en 1954.*

Arg-546-1100 (2013-07-17 21:48:20)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la ekumena eklezia kant-libro "Adoru", n-ro 744. Pri la tradukinto, la nederlanda esperantisto H. A. de Hoog, estas notita io en la vikipedia retejo http://eo.wikipedia.org/wiki/Hendrik_Arie_de_Hoog.